*Decembro 1953 / Januaro 1954 Nroj 4-5*

# LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO"

*Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando*

*Ĝiro de TEJO Nro 537168* *Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro*

Nia Redakcio ricevis inviton por partopreni la Eŭropan Junulartagon en 's-Gravenhage, Nederlando. Por LJV ĉeestis nia amiko K. Kranenburg, Steenschuur 10. Nederlando, kies raporton vi ĉi tie povas legi.

**Eŭropa Junulartago en Hago.**

En la kunvenejo kie ĉeestis 5000 gejunuloj, pendis de la plafono la flagoj de la partoprenantaj landoj kaj la eŭropa flago.

F-ino Twaalfhoven bonvenigis la eksterlandanojn. I.a. ŝi diris: „Ni kunvivas kun la klopodoj faritaj per la delegitoj de niaj respektivaj landoj. Ni kunvenas ĉi tie por subteni ilin. Ni estu pretaj doni personajn oferojn por akiri unuecon."

La orhestro de B. Silbermann koncertis. La muziko estis bela kaj forta aplaŭdo esprimis la dankon de la ĉeestantoj.

Post la paŭzo la Baledo-grupo „Scapino" prezentis la fabelon „Princino sur pizo". Kvankam mi persone ne ŝatas baledojn, la gejunuloj bone dancis.

Tuthazarde mi renkontis en la paŭzo nian francan amikon Lucien Giloteaux. Ĝoje ni salutis unu la alian. Ankaŭ kelkaj aliaj esp.istoj ĉeestis. Bedaŭrinde ankaŭ ili ne sukcesis propagandi E-n, ĉar ili ne estis sufiĉe grandnombraj. De Lucien mi aŭdis, ke la fina kunveno okazos sur la „Binnenhof". Ni eniris la urbon kaj per mia kongreskarto mi vespere sukcesis eniri la „Binnenhof (la sidejo de l' diversaj ministerioj). Je la 7a vespere la partoprenantoj kunvenis sur la „Malieveld" kaj de tie oni ekiris procesie kun torĉoj kaj tri orhestroj. Propagandcele oni transiris la urbon kaj alvenis je la 8a sur la „Binnenhof".

Tie mi kontaktis kun kelkaj personoj, kiuj parolis la francan lingvon. Pere de la helpo de Lucien mi demandis ilin, kion ili pensas pri Esperanto. Iu sinjoro donis pripensin-

daŭrigo sur p. 2.

**La Estraro kaj la Redakcio deziras al ĉiuj legantoj feliĉan kaj prosperan novan jaron, esperante vin renkonti dum nia jubilea kongreso en Hilversum.**

**Anoncu vin kiel eble plej baldaŭ por nia kongreso. Legu nian artikoleton.**

# *PARENTEZE.*

## *Emanuelo kaj la Fenomeno.*

*Okazis antaŭ tri jaroj.*

*Emanuelo kaj mi sidis en la lasta klaso de la lernejo. Ambaŭ ni adoris la internacian lingvon kaj Emanuelo eĉ fariĝis sovaĝa, se iu kontraŭstaris nian idealon. Iun tagon li eniris la klason kun ĵurnalo el kiu li laŭte legis: „Esperanto, kiel edziĝilo! Du junaj homoj el diversaj landoj trovis unu la alian per la internacia lingvo Esperanto. Hieraŭ en la Amsterdama urbdomo ......” Leginte la novaĵon, li triumfe ĉirkaŭrigardis kaj diris: „Jen vi vidas la multajn eblecojn de Esperanto”. Tamen unu el la knabinoj - Sonjo - asertis, ke ne povas esti eble esprimi per tiu helplingvo ĉiujn pensojn kaj certe ne la pli intimajn. Emanuelo tiam tondris: „Ne eble, ne eble; diru al mi kial ne. Vi lernu la lingvon kaj vi vidos ke ĝi estas fenomeno!”*

*La klaso dividiĝis en du grupoj: la por- kaj kontraŭ-grupoj. Ĉiuj samtempe kriis kaj kiam eniris la instruisto, ĉi-tiu ankoraŭ ĝustatempe povis malebligi sangan batalon! Al mi li demandis la kaŭzon de nia ekscititeco kaj mi kun ruĝiĝinta kapo rakontis pri Emanuelo, pri la ĵurnalo kaj la disputo. La instruisto estis saĝa homo kaj konsilis al Sonjo lerni la lingvon por ke ŝi mem spertu ......*

*Post kiam ni finstudis kaj forlasis la lernejon mi ne revidis Emanuelon ĝis hodiaŭmatene. Tre hazarde mi lin renkontis en la tramo. Kiam mi vidis lian verdan stelon grandan, mi subite rememoris la disputon en la klaso pri Esperanto. Mi scivole demandis, ĉu li ankoraŭ aŭdis ion de Sonjo kaj li respondis: „Jes pasintjare ni geedziĝis!” kaj senrespiro li aldonis: „Esperanto estas fenomeno!”*



---

*daŭrigo de p. 1.*

dan respondon: „Oni bezonas kuraĝon por lerni E-n, ĉar ankoraŭ estas nur malmultaj E-istoj.” Laŭ li estus pli bone lerni la anglan lingvon. Mi demandis lin en Esperanto - Lucien tradukis - ĉu lia opinie ne ĉiam parto de la homaro rifuzos lerni la anglan lingvon kaŭze de malamikeco koncerne la anglan popolon. Li respondis: „Se oni havas intereson, oni lernos la anglan lingvon, la kunlaborado ne dependas de la lingvo. Estas historia kutimo uzi la anglan lingvon kaj ankaŭ en la NATO ĉiuj esprimoj teĥnikaj jam uziĝas anglalingve.”

Malgraŭ la fidon al la angla lingvo, kiun esprimas tia respondo, la persona kontakto inter la partoprenantoj diverslandaj estis nula. La programo konsistis el bildoj, ĉar oni ne kapablis trovi lingvon komprenatan de ĉiuj partoprenantoj.

La 5000 gejunuloj tute plenigis la placon de la „Binnenhof”. Multaj parolantoj instigis la junularon; el iliaj paroloj mi citas kelkajn frazojn:

Belgo (franca parto): „Malgraŭ kontraŭstaro en diversaj punktoj, ni samopinias. Multe da kontraŭlaboro estis, sed la junularo fidas la Eŭropan Unuecon.”

Belgo (flandra): „Mi petas vin forŝovi viajn naciajn sentojn kaj labori por Eŭropa Unueco.”

Germano: „La laboro ne estas ankoraŭ finita, sed tio ne estas la kul-

po de la delegitoj, kiuj forte laboris. Se vi (la delegitoj) estos revenintaj al viaj landoj, vi bezonas kuraĝon, kuraĝon kaj refoje kuraĝon. La gejunuloj subtenas vin, ne malkuraĝiĝu, kunlaboro ja estas ebla."

Parolanto el Orient-Germanujo: „Multaj fuĝas al Okcident-Germanujo por havi viveblecon, ĉar tio en Orient-Germanujo ne plu estas ebla. Via unueco signifas por ni liberecon."

Franco: „Vi ĵetis vin en la batalon, ne forlasu la arenon dum la lasta batalo."

Saarlandano: „La delegitoj parolis la samajn vortojn, sed se oni ne faras decidojn, la junularo eble sekvos alian direkton. Ne estu tima, la junularo *nun* sekvas vin."

Nederlandano: „Ni estas dankaj pro la farita laboro, sed postulas, ke oni ne malfortiĝu. Preterpasu sanktajn domojn kaj dometojn, ni estas pretaj por daŭrigi la batalon."

La nederlanda delegito dankis la parolintojn. Li akcentis ke la subteno de la junularo ĝojigas la delegitojn kaj donas al ili fidon. Fine parolis Sro P. H. Spaak el Belgujo: „Nome de la delegitoj mi dankas pro la manifestado. Ni estas konvinkitaj de via subteno kaj tio donas al ni grandan respondecon.

La eŭropa ideo jam aperis post la unua mondmilito, nun ni ne lasu la okazon preterpasi, sed kaptu ĝin (aplaŭdo). La ĉefidealo estas daŭra, justa kaj longa paco. (aplaŭdo)

La demando estas, ĉu ni baldaŭ kreos eŭropan unuecon. Se ne, ni fiaskos. Nia celo estas la eŭropan unuecon en 1954 ekfunkciigi. En la aŭtuno ni organizos voĉdonadon, do elektu viajn delegitojn."

Li finis jene: „Por pruvi, ke mi estas vera eŭropeano, mi nun diras en 4 lingvoj: „antaŭen!" (Li parolis franclingve kaj diris france, germane, itale kaj nederlande la vortojn: avant, vorwärts, avanti, voorwaarts).

Kvankam la paroladoj estis sufiĉe sentoplenaj, mi opinias, ke la fakto, ke la partoprenantoj ne kapablis komunan lingvon paroli, multe malhelpis al la komprenado. La partoprenantoj de iu lando restis ĉiam kune. Oni ne havis eblecon interparoli kun alilandanoj kaj ankaŭ se oni aplaŭdis, laŭ la loko de la aplaŭdintoj oni tuj povis diveni, kies reprezentanto parolis. Parolis germano, la aplaŭdo venis el la porgermana angulo, parolis franco, oni aplaŭdis en la alia angulo. Same dum la marŝado: oni marŝis kun samlandanoj. Estas bedaŭrinde, ke partoprenis nur malmultaj esperantistoj, ĉar alie povis la diverslandaj esperantistoj formi propran grupon. Nur kelkajn oni ne rimarkas en la granda amaso.

Laŭ mi estas eble kaj tio dependas nur de la esperantistaro, ke ni povu formi pli grandaj grupojn. En Hago ĉeestis nur kelkaj francaj kaj nederlandaj esperantistoj. Sed se el ĉiu lando partoprenus ekz. *dek* oni povus formi esperantistan rondon en la kongreso. *Ĉi tie troviĝas laboro por la perantoj. Se en via lando okazas grava internacia kongreso, anoncu tion en LJV kun informoj kaj invito. Niaj kongresoj estas gravaj sed ne malpli gravaj estas la ne-esperantistaj internaciaj kongresoj.*

---

**Perantoj! Ne forgesu sendi viajn raportojn regule kaj ĝustatempe al la sekretario.**

---

# Originaleco de la Tutmonda Junularo.

Dum kvar jaroj mi redaktis „La Vivo"-n kaj kontaktis kun junaj homoj el multaj landoj. Mi ricevis dekojn da originalaj leteroj kaj neniam konstatis, ke la franca junularo estas pli originala, ol la junularo en aliaj landoj.

Nia franca amiko faris gravan eraron. Li kutimis skribi en la lingvo de la retoriko. Mi konsilas al li skribi en la lingvo de la koro. Per la lasta ni povas veki la originalajn ideojn en la animo de la junularo. Ĝi estas tre simpla, sen ornamaĵoj.

Mi kopias leteron de juna angla amiko:

Leeds, 15-10-'48.

Vere mi havas *du* karakterojn. La unua estas la gaja, senrespondeca, juna, nezorga karaktero de normala junulo. Mi ŝatas belan kruron de bela fraŭlino: mi ŝatas danci kaj ĵazi, porti vestaĵojn kun grandaj ŝultroj, ktp. En mia alia karaktero mi estas serioza, pensema homo, vegetarano kaj socialisto. Mi ofte paroladis ĉe junulkluboj pri Esperanto. Kaj mi eĉ instruis klasojn de geknaboj, proksime samaĝajn, sed *ili* tion ne scias.

Nun miaj pekegoj pri la junularaj asocioj en la Esp. movado. *Junuloj pli ol 16 jaraj devas havi la duan seriozan karakteron por esti esperantistoj.* En la Leedsa Esp. Societo estas tiom da plenaĝaj (kaj troaĝaj) virinoj, tiom da strikt-moralaj viroj, ke iu junulo, kiu eniras, eĉ timus E-n de tiam. Se mi enirus kun fraŭlin-amikino (ne amatino, sed ametatino), oni dirus: nemoralulo!

Do mi provis formi klubon (Int. Junulara Klubo) de modernaj pliaĝaj junuloj (16-30) por modernigi la movadon. Lastan jaron mi en Leeds propagandis dum unu plena monato. La „Leeds Esp. Societo" alvokis la publikon vidi lumbild-montradon kun parolado. Ni (I.J.K.) petis la publikon por danci ĉe moderna dancejo laŭ unu el la plej bonaj sving-orkestroj en Yorkshire. Kiu el ni du (L.E.S.-I.J.K.) pli bone varbis junulojn?? Ĉu vi konsentas, ke ni *devas* plimoderniĝi? Mi neniam forgesos la vortojn de unu el miaj amikoj, kiam li diris: „Ne, mi ne lernos E-n. Se mi farus tion, mi devus intermiksiĝi kun maljunaj virgulinoj kaj „cranks" (t.e. pacifistoj, vegetaranoj, ismistoj ĉiaj, kiuj portas barbon, flavajn vestojn, sandalojn, ktp.) Li tute pravas kaj mi hontus peti lin lerni E-n, ĝis ni ne havas bonan movadon por la junuloj.

Kiaj estas la interesoj de la „normala" junul(in)o? (Mi nur priparolas la pli ol 16 jarajn).

Unue sekso kaj amo. Due dancoj, muzikoj, humoro kaj aliaj *neseriozaj* aferoj. Eĉ la plej serioza junulo en la mondo, tiu, kiu ambicias ŝanĝi la mondon tute (kiel mi), devas *iam* malrigidiĝi kaj iam la seriozaj ambicioj malkreskas pro seksaj ambicioj (t.e. dum kelkaj horoj).

Mi ne volas havi seksan aŭ nemoralan movadon. Nur malpli rigidan movadon por la ordinara junularo.

Kon Walsh.

Post la apero de ĉi tiu letero de Kon Walsh en „La Vivo" mi certe ricevis pli ol 40 leterojn, en kiuj la junularo esprimis siajn pensojn kaj sentojn. Ĉi tiu originala letero kuraĝigis la junularon ankaŭ esprimi siajn ideojn en leteroj. Espereble post la legado de ĉi tiu letero la legantoj de LJV montras al nia franca amiko, ke originalaj ideoj vivas en ĉiu junulo. Sendu ilin al la red. de LJV.

E. v. Veenendaal-Bouwes.

# HILVERSUM, LA RADIOURBO DE NEDERLANDO, AKCEPTOS LA 10an I.J.K. DE T.E.J.O.

La deka internacia junularkunveno de T.E.J.O. okazos en Hilversum, la radiourbo de Nederlando. Kvankam la kongreso okazos jam por la tria fojo postmilite en Nederlando, ni tamen opiniis tion preferinda pro la fakto, ke la Universala Kongreso venonta estas organizata en Haarlem. Krome la regiono, en kiu Hilversum situas, tute diferencas de la pejzaĝoj, en kiuj kuŝas la antaŭaj kongreslokoj: Haarlem kaj Groet.

**Datoj:**

La kongreso komenciĝos per solena inaŭguro, kiu okazos sabaton, la 24an de julio 1954a posttagmeze; la ferma vespero okazos vendredon, la 30an de julio. La kongresanoj, kiuj volas partopreni post la I.J.K. de T.E.J.O. ankaŭ la Universalan Kongreson, do povos vojaĝi al Haarlem je la 31a de julio kaj havos sufiĉe da tempo fari ĉiujn necesajn aranĝojn. La vojaĝo de Hilversum al Haarlem daŭras proksimume unu horon. Tiuj, kiuj sabaton ne povas sufiĉe frue esti en Hilversum por ĉeesti la oficialan inaŭguron, alvenu en Hilversum jam vendredon. L.O.K. faros por ili apartan aranĝon.

**Iom pri Hilversum:**


Hilversum situas en „Het Gooi", belega regiono kun arbaroj, erikejoj kaj lagoj; ĝi estas unika radiocentro, en ĝi vi trovos la tutan aparataron de la nederlanda radio, la teĥnikajn ekipaĵojn, kaj la elsendejojn. Hilversum estas ĉarma mezgranda urbo, moderne konstruita, kun multaj elstaraj monumentoj de moderna arkitekturo kaj pitoreskaj malnovaj stratetoj, kun abundo da lukse aranĝitaj ĝardenoj kaj parkoj. La urbo estas altfrekvente vizitata de en- kaj eksterlandaj turistoj, favore situas por ekskursoj al ĉiuj direktoj kaj ĝiaj ebloj por feriantoj estas tiom multvariaj, ke ĝi garantias neforgeseblan ferio-semajnon.

Hilversum situas je 16 kilometra distanco de la urbo Utrecht, centro de la nederlandaj fervojoj kaj je 24 kilometra distanco de Amsterdam, la ĉefurbo de Nederlando kaj neelĉerpebla fonto de vidindaĵoj. Ĉiun duonhoron modernaj elektraj vagonaroj iras de Hilversum al ĉiuj direktoj. Haarlem situas je distanco de 40 kilometroj kaj estos facile atingebla.

**Kelkaj eroj el la programo:**

Kompreneble ni ankoraŭ ne povas publikigi ĉiujn detalojn el la programo. Jen tamen kelkaj ĉefaj punktoj, kiuj certe konvinkos vin, ke vi ne malĉeestu nian dekan I.J.K.

La akcepto kaj solena inaŭguro okazos en la Civitana Salono de la Urbdomo, brila ekzemplo de moderna arkitekturo. Dimanĉe okazos diservoj en Esperanto. Multaj festvesperoj troviĝas sur la programo, i.a. interkona vespero, kultura vespero, internacia kabaredo kaj internacia balo. Krom la jarkunvenon ni ĉeestos grandan propagandan kunvenon, aranĝotan de la Centra Komitato de la Esperantista Junularmovado en Nederlando kaj ni aŭskultos aŭ partoprenos la paroladkonkurson. Kelkaj tre belaj ekskursoj okazos, i.a. al Amsterdam, Rotterdam, Den Haag, Scheveningen (marbordo) k.t.p.



La urbodomo de Hilversumo.

**Loka Organiza Komitato:**

La Loka Organiza Komitato konsistas el la jenaj personoj:

Prezidanto: Henk Uittenbogaard, eks-peranto de T.E.J.O. en Nederlando.

Sekretario: Roel Kraefft, prezidanto-redaktoro de la Junular-Komunumo de A.L.E.-F.L.E., prezidanto de C.K.E.J.N.

Kasisto: S.ro Jorksveld, asekura specialisto ĉe Philips.

2a Sekretario: Ko Wallenburg, kasisto de la nederlanda sekcio de T.E.J.O.

2a Kasisto: Bernard van Moorst, prezidanto de sportklubo en „Het Gooi".

Propagando: Han Put, membro Hilversuma Propaganda Komitato.

Programo: Wil Uittenbogaard, artisto de la Nederlanda Radio Unio.

Konsilanto: Tammo Kanter, internacia prezidanto de T.E.J.O., redaktoro de C.K.E.J.N.

La adreso de la L.O.K. estas Lobeliastraat 4, Hilversum. La numeron de nia ĝirkonto ni poste publikigos.

**Pri la kongresejo:**

La kostoj de hoteloj, pensionoj k.t.p. en Nederlando dum la lastaj jaroj ege altiĝis, tiel eĉ, ke ne eblus okazigi la kongreson, kiam la partoprenontoj devus individue tranokti kaj manĝi. Dank' al la kunlaboro de la komunumestraro, ni sukcesis lui la grandajn Sporthalojn en Hilversum kaj la al ĝi ligitan restoracion, ĉiuj manĝoj kaj kunestoj, kaj ankaŭ la dormado okazos en la kongresejo. Per tio ni sukcesis grave redukti la kostojn.

Por tiuj, kiuj nepre ne deziras tranokti en komuna dormejo, L.O.K. estas preta rezervi ĉambron en pensiono aŭ hotelo kontraŭ ekstra pago de guldenoj 2.50. Pro la altaj kostoj (minimume 20 guldenoj) ni tamen forte malrekomendas tion, kaj ni nepre konsilas restadon en la kongresejo.

**Prezoj:**

Por la tuta kongreso, manĝado, dormado, kostoj de la programo, ekskursoj k.t.p.:

por tiuj, kiuj aliĝas antaŭ la 15a de majo 1954a: por TEJO-anoj gld 55.— por ne-membroj de T.E.J.O. gld 60.— por tiuj, kiuj aliĝas post la 15a de majo 1954a: por TEJO-anoj gld 57.50 por ne membroj de T.E.J.O. gld 62.50 Por tiuj, kiuj dormos kaj matenmanĝos ekster la kongreso, sed cetere kun lunĉo, vespermanĝo kaj ĉiuj aranĝoj: Por T.E.J.O.-anoj gld 50.— por ne membroj de T.E.J.O. gld 55.— ankaŭ ĉi tiuj prezoj altiĝas per gld 2.50 post la 15a de majo 1954a. Ekstraj kostoj por rezervado de pensiono aŭ hotelo gld 2.50

**Aliĝkostoj:**

La aliĝkostoj sumiĝas: la plenaj kongreskostoj minus gld 35.—. Tiuj, kiuj petas rezervadon de pensiono krome antaŭpagas ĉe aliĝo: la ekstrajn kostojn por rezervado (gld 2.50) kaj garantian sumon de gld 15.— por la pensiono. Ĉi lasta garantio estas necesa, ĉar dum la feriosezono ĉiuj pensionoj kaj hoteloj en Hilversum estas plenplenaj, sekve ni devas frue rezervi kaj garantii la ĉambrojn.

**Ekagado por partopreni la kongreson:**

La sekvonta I.J.K. de T.E.J.O. estas la *deka* kongreso, pro tio ĝi havos speciale festan karakteron. Jam nun rezervu vian ferion por veni al Hilversum, jam nun ekŝparu!! Landaj kaj lokaj perantoj faru la unuajn paŝojn por aranĝi karavanojn. *La DEKA I.J.K. havu rekordan nombron da partoprenantoj!!*

Pluaj komunikoj sekvos en la sekvonta numero de L.J.V. Atentu la adreson de L.O.K., por informoj, specialaj deziroj, sugestoj k.t.p. vi skribu al la sekretario, adreso: Lobeliastraat 4, Hilversum, Nederlando.

R. K.

---

## ĈU VI ESTAS EKS-STUDENTO DE SUPERA KOMERCA LERNEJO?

Se jes, interesas vin scii, ke la problemo de la Internacia lingvo estos unu el la temoj de la XIV. Internacia Kongreso de Eksstudentoj de la Supera Komerca Instruado, kiu okazos en Lyon, Francujo de junio 26, ĝis julio 4.1954.

Pli ol ducent asocioj el la tuta mondo sendos delegitojn al tiu Kongreso, kiu celas organizi la kunlaboradon de eks-studentoj de la Supera Komerca Instruado sur praktikaj fundamentoj.

Tre dezirinde estas ke multaj Esperantistoj partoprenu kondiĉe ke ili mem estu eks-studentoj de iu Supera Komerca Lernejo.

Interesatoj bonvolu tuj skribi al Richard LEVIN, Président de l'Association des Anciens Elèves de l'Ecole Supérieure de Commerce de Lyon, 34, rue de la Charité, Lyon, indikante en kiu Sup. Komerca Lernejo ili lernis, de kiu dato al kiu dato tio okazis, kaj kiun diplomon ili ricevis ĉe la fino de la studado.

# ORGANIŻAJ INFORMOJ.

**Nederlandaj TEJO-anoj bonvolu atenti: en la novembra numero de LJV aperis malĝusta adreso de nia peranto Sro K. Kranenburg. La ĝusta adreso estas Steenschuur 10 (ne Steenschuurweg!). Por ĝiri ian sumon uzu la ĝirnron de lia patrino, S-ino W. Kranenburg-Brakel, sama adreso, Nro 310559.**

---

## Ekspozicio Internacia.

Tre ĉarma ideo naskiĝis antaŭ jaroj en Gvatemala. Estis la ideo pri internacia kolektado de infandesegnoj. Kompreneble tiu bone sukcesis, ĉar pri infanoj la intereso ĉiam estas granda.

La esperantoklubo la Aglo en Karlskoga, Svedlando, nun kaptis la ideon. Knabino en nia urbo nome gajnis diplomon en tiu internacia ekspozicio en Gvatemalo, kaj tio vekis intereson ĉe ni. Ni aranĝos de la 3a ĝis 13a de septembro 1954 en la Arta halo montradon kaj konkurson internacian. En tiu konkurso oni disdonos premiojn je valoro de 750 steloj, ĉ. US-dol. 60.—, tiel ke la gajnonto en ĉiu jarklaso de 7 ĝis 14 jaroj ricevos premion je valoro de ĉ. 55 steloj, kaj la sekvontaj 4 po unu.

Ni esperas, ke samideanoj ĉirkaŭ la terglobo interesiĝos pri la afero kaj kunhelpos instigante la instruistojn aranĝi en siaj klasoj desegnadon sub la temo *Nia lando kaj popolo.* El tiuj desegnoj ni petas la instruistojn elekti la plej bonajn kaj sendi al la suba adreso.

Se la montrado fariĝos sukcesa eble estos aranĝata migranta ekspozicio tra tuta Svedlando. Dorsflanke de la desegnoj skribu PRESLITERE nomon kaj adreson, sub la bildo titolon, nomon, aĝon kaj landon. La desegnoj devas esti ĉi tie antaŭ la fino de junio 1954 sub adreso: Kga Esp. soc. la Aglo c/o Gunhild Tistad, Hotellgatan 5, KARLSKOGA, Svedlando.

Por Karlskoga Esperanto Societo, la Aglo.

Edvin Bonander, prez.
Gunhild Tistad, sekr.

---

## Oficialaj Informoj
## de la Akademio de Esperanto
### (N-ro 21 - Oktobro 1953).

Por simpligi la procedon de la elektoj, unu frazo estas aldonita al art. 6 de la Statuto, traktanta pri la elektoj. Tiu artikolo nun havas la jenan enhavon (la aldonita frazo estas inter cithokoj):

ARTIKOLO 6. La membroj de la Akademio estas elektataj de la Akademio mem per absoluta plimulto de la voĉdonantoj. „Se devas okazi rebaloto, ĉar ne sufiĉe da kandidatoj ricevis la absolutan plimulton, en tiu rebaloto la relativa plimulto decidas." En okazo de nombroegaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.

ELEKTO DE AKADEMIANOJ.

Post la okazintaj elektoj kaj rebalotoj laŭ la ŝanĝita art. 6 de la Statuto, la konsisto de la Akademio nun estas jena:
(La nomliston ni ne represas pro manko de loko).

---

**Ĉu vi jam pagis vian kotizon? Se ankoraŭ ne, nepre faru tion tuj.**

---

Kiel novaj membroj eniris la Akademion: G. Canuto, F. A. F. Faulhaber, W. J. A. Manders, J. Régulo Pérez kaj K. Söderberg.
Tri malnovaj membroj ne estas reelektitaj.

### PUBLIKA KUNVENO DE LA AKADEMIO DUM LA UNIVERSALA KONGRESO EN HAARLEM.

En la kadro de la 39-a Universala Kongreso de Esperanto en Haarlem denove okazos publika kunveno de la Akademio, en kiu la partoprenantoj havos la okazon direkti prilingvajn demandojn al la Akademio kaj libere diskuti pri lingvaj aferoj.

Proponoj por la tagordo de tiu kunveno povas jam nun esti sendataj al la adreso de la Akademio, sed ili devas atingi tiun adreson almenaŭ antaŭ la fino de Junio 1954. Ili povas esti duspecaj:

1. Oni povas formuli demandon pri iu lingva problemo rilata al Esperanto, pri kiu la Prezidanto kaj la aliaj ĉeestantaj Akademianoj donos sian opinion.
2. Oni povos mem enkonduki iun temon pri la lingvo Esperanto en la kunveno kaj defendi ĝin.

En ambaŭ okazoj povos sekvi liberaj diskutoj laŭ la disponebla tempo. Ĉar tiu tempo estos limigita la Akademio fiksos antaŭe la tagordon kaj elektos por tio la plej gravajn demandojn kaj temojn, fiksante ilian sinsekvon en la pritrakto.

En la tagordo aperos ekskluzive demandoj kaj temoj de ĉeestantaj personoj.

### PETO AL LA ELDONISTOJ DE ESPERANTAJ LIBROJ KAJ GAZETOJ.

La eldonistoj de Esperantaj libroj kaj gazetoj estas petataj sendi al la Akademio almenaŭ unu ekzempleron de siaj novaj eldonoj.


*Ir. J. R. G. Isbrucker, Prezidanto.*

## Estimataj gesinjoroj!

Regule ni ĝis nun ricevis vian ŝatatan gazeton „La juna vivo" ĝis al nro. 10 de Junio kiu eble perdiĝis kaj ni dankas elkore al vi kaj ĉiuj gesamideanoj kiuj helpe de financa subteno ebligas alsendon de via gazeto; nia junularo precipe ŝatas legadon en tiu ĉi gazeto, ekvidante el ĝi junularan movadon tutmondan kaj treege bedaŭras, nepovante partopreni al diversaj kunvenoj; tamen la informoj en la gazeto fortigas iliajn vicojn kaj spertojn kaj ni ĉiuj kredas, ke nia tutmonda pacama laboro finfine venkos.

Esperante, ke ankaŭ en venonta jaro niaj junaj anoj ricevos vian ŝatatan gazeton, ni deziras al via plua laboro plenan sukceson, ĝojan Kristnaskfeston kaj plej bonan Novjaron kaj restas kun koraj, samideanaj salutaj, sincere

por: Esperanto-Servo Č. Budejovice,
Šumavská 250, Čehoslovakio.



## KORESPOND-ADRESOJ

*Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.*

**Nederlando:** 8 gelernantoj 11-jaraj dez. kor. Resp. certa. Skribu al: F-ino M. Renooy, B. Bottemanneplein 2, Alkmaar.

## FACILAJ LEGAĴOJ.

### La formiko kaj la grilo.

Estas malvarma vintro. La kampojn, la arbarojn, la stratojn, la domojn, ĉion-ĉion kovras neĝo. Neniu estas videbla sur la stratoj, la homoj sidas en la varmaj ĉambroj. Ankaŭ la bestoj sidas en siaj loĝejoj kaj atendas la printempon.

Sed kiu marŝas tie en la neĝo? Malgranda, nigra besteto: eta grilo. Ĝi tremas pro la malvarmo kaj ĝi estas malsata.

Kien ĝi iras? Ĝi ja trovos manĝaĵon nenie. Neĝo kovras ĉion. La grilo ĉirkaŭrigardas. Neniu pordo estas malfermita. Ĝi iras malrapide, ĝi estas malforta pro la malsato.

Ĝi haltas antaŭ malalta loĝejeto. En tiu loĝejo loĝas la formiko. Dum la somero la grilo kaj la formiko tre ofte paroladis kaj la eta formiko ofte riproĉis al la grilo, ke ĝi nenion kolektas por la vintro. Tiam la grilo ridis, nun ĝi staras humile antaŭ la enirejo de la formika-domo.

La grilo frapas sur la pordo. Neniu malfermas ĝin. Ĝi frapas ankoraŭ foje, nun jam pli forte.

„Kiu frapas mian pordon?" demandas dormema voĉo.

„Mi, la grilo. Bonvolu malfermi vian pordon, kara formiko."

La formiko malfermas la pordon de sia loĝejo kaj kun miro rigardas al la grilo.

„Kion vi faras sur la strato en tia vetero?" demandas la formiko kun miro al la grilo.

„Mi ne plu povas elteni en mia loĝejo. Bonvolu lasi min en vian domon. Mi tremas pro la malvarmo. Kaj mi estas tre malsata."

„Kion vi diras?" eĉ pli miras la formiko. Ĉu vi tremas pro la malvarmo? Ĉu vi do ne kolektis hejtmaterialon dum la somero? Ĉu vi estas tre malsata? Ĉu vi do ne kolektis ian manĝaĵon por la vintro?"

La grilo devas kun honto rekoni, ke ĝi nenion kolektis.

„Kion vi do faris dum la tuta somero?" demandas severe la formiko.

„Mi muzikis, dum la tuta somero mi muzikis", respondis la grilo.

„Ĉu vi rememoras, ke mi ofte admonis vin, ke vi ion kolektu por la vintro?" demandas la formiko.

„Jes, kara formiko, mi scias tion. Sed mi ne volis aŭskulti je vi. Mi preferis muziki."

La formiko estas tre kolera pro tiom da inerteco. Ĝi diras: „Se vi dum la somero muzikis, nun bonvolu danci. Mi donos al vi nenion, ĉar mi ne scias, ĝis kiam daŭros la vintro."

Ĝi fermas denove sian pordon kaj la grilo devas reiri al sia hejmo, malvarma, malsata.

Kiu ne kolektas en la ĝusta tempo, havas nenian provizon en kazo de bezono.

la burĝono
MONATA ORGANO POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



## La vintro.

La jaro havas kvar sezonojn. Ili estas la printempo, la somero, la aŭtuno kaj la vintro. La plej malvarma sezono estas la vintro. Tamen multaj infanoj ŝatas la vintron. Dum la vintro kutime frostas kaj neĝo kovras ĉion. La vento forte blovas. La infanoj ŝatas la neĝon, ĉar ili povas agrable ludi per ĝi. Ili faras neĝpilkojn kaj organizas neĝpilko-batalojn. Aŭ ili kolektas la neĝon kaj konstruas per ĝi grandajn neĝ-pupojn. La okulojn de la neĝpupo ili formas per karboj, la nazo estas ruĝa karoto kaj en la buŝon ili metas pipon. La neĝpupo havas ofte balailon en la mano. Ankaŭ la butonoj sur la mantelo de la neĝpupo kaj la dentoj en ĝia buŝo estas malgrandaj pecoj da karbo.

Sur la glaciejo la infanoj povas glitkuri. Ili gaje ridas. Iliaj manoj kaj vizaĝo estas ruĝaj pro la malvarmo.

En la monta regiono oni povas ski-kuri. Multaj homoj vojaĝas al la montoj por skii.

Sed ne ĉiuj estas dum la vintro gajaj. Multaj bestoj malsatas, ĉar ili ne trovas ion por manĝi. Neniaj folioj estas sur la arboj, la herbojn kovras neĝo. La birdetoj flugas al la domoj, ili petas nutraĵon de la homoj. La infanoj ĵetas paneron por la birdoj, aŭ ili faras malgrandajn birdodometojn, kie ĉiam estas sufiĉe da manĝaĵo kaj da trinkaĵo por la malgrandaj plumaj amiketoj.

La infanoj faras por la birdoj ankaŭ ofte ĉenon el arakidoj. La birdoj tre ŝatas tion. Jen kaj jen oni metas ankaŭ malgrandan pecon da lardo en la birdodometon, por ke la birdoj ne malsatu.

La bonaj homoj ne forgesas, ankaŭ la bestojn en la arbaroj. Oni portas tien fojnon por la cervoj kaj kapreoloj.

Kiam estas multe da neĝo sur la stratoj, la homoj veturas per glit-veturiloj. Precipe la infanoj tre volonte glitveturas. Ĉu ankaŭ vi ŝatas glitveturi?

Ne forgesu la birdojn dum la vintro, ili estos al vi dankaj dum la printempo kaj la somero.

Zorgu bone ankaŭ pri la aliaj bestoj, ne lasu ilin longe stari en la malvarma aero.

La bestoj ne povas paroli, ili ne povas diri, kiam al ili estas malvarme.

## Simplaj A-B-C-rimoj.

A por akvo en la bano
B por bebo kaj banano.
C por cigno, blanka, bela,
Ĉ ĉevalo tre fidela.
D por domo, hejmo kara
E por elfo, tre bonfara.
F por fajro, tre utila,
G por gemo, ĉiam brila.
Ĝ ĝardeno kun legomoj,
H por hundo kaj por homoj.
Ĥ por ĥoro, tre muzika,
I insekto, eble pika.
J por jupo, kaj por jako,
Ĵ ĵurnalo en la sako.

K kandelo kun lumeto
L por libro sur la breto.
M por muso, eta besto,
N por nukso kaj por nesto.
O por ovo kaj oranĝo,
P por pano: bona manĝo.
R por robo kaj por reĝo,
S por sofo kaj por seĝo.
Ŝ por ŝalo kaj por ŝuo,
T por tablo kaj por truo.
U por urso kaj uncio,
Ŭ por ŭa, la beba krio.
V por vazo kaj por vesto,
Z por zebro, bona besto.

Nenjo Rimanto.
(Kopirajto rezervita).

## Lernu desegni:

Tiel vi desegnas belan cignon:

